15-6-66

Jaro IV/VIII. N-o 6-7 (42-43). Marto-Aprilo 1927.



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

LITERATURO — SCIENCO — PEDAGOGIO

ENHAVO:

Leon Bergiers: Suferi. — *L. Ivn:* En kazernon! Vers. *Karl Johansson:* Vivi en mizero ne toleru sklavo. Vers. — *August Strindberg:* La posedrajto. Trad. K. J. — La almozulo. Trad. E. Benedikt. — *C. F. Magaszázi-Hochhaeuser:* Mia violono. — *Tagulo:* La maro. Vers. — *Hristo Botev:* Ridinda ploro. Trad. Stebek. — *A. Braŭdo:* Ludoviko Beethoven 1770–1827. Trad. Vincent Milk. — *E. Spiridoviĉ:* La skemo de lingva evoluo (3). — *A. Pinkeviĉ:* La granda edukisto. Skizo pri Pestalozzi. Trad. Dem. — *Célestin Freinet:* Tipografio en lernejo.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo 1 (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

SUFERI

LEON BERGIERS

Al Otto Stöber.

1

Li sidas apud la hejtilo. Obsedaj pensoj kaptas nekontraŭstareble lin. Pro kio do vivas tiel malfeliĉegaj homoj? Pro kio ekzistas tiu sen-justeco kiu volas ke estaĵoj senĉese suferegu dum aliaj per samaj materioj estigitaj senfine amuziĝu. Ilia ĉefa amuzo estas la vidado de l' ploroj de la aliuloj. Pro kio? Pro kio? La doloranta kapo inter siaj du pugnoj, la senbrila rigardo, fiksata al la nigra poto de la hejt-ilo, li profunde pensas... kaj kelkfoje varma larmo falas sur lian eluzitan pantalonon. La pasinto kun timiga precizeco revenas al li... Estas kvazaŭ sendorma terursonĝo. Ha! tiu milito senglorega kaj hontiga! Ha! malfeliĉa Johanino mortinta! Kaj ci ho! milda Karlĉjo! Pro kio vi forflugis? Pro kio en tiu kruela soleco mi devas suferegi ĉi tie?

Estas kristnaska vespero....

La tuta vilaĝanaro festegas. La drinkaĵoj ruĝigas kaj gajigas la vizaĝojn de la kunestantaj kruduloj. Polkoj sekvas valsojn. Ĉiuj dancas. La geamantoj flamiĝantaj kelkfoje apartiĝas por sin surbuŝe interkisi. Iafoje la knabegoj, kuraĝigite de la provokantaj rigardoj de la belulinoj, riskas enprofundigi siajn dikajn manojn en la korsaĵojn de la inoj, por palpi tiun delikatan karnon, tiel eligante el la plenkarnaj gorĝoj ĝukrion. Oni ne sin ĝenas! Kaj la maljunaj ne abdikas; male, ili estas la plej fervoraj. Kiaj viroj! Eble en la nokto, kiam ĉiuj estos ebriaj, pluraj el ili trafos okazon por rehejmiĝi kun virino, ne forges-ante fari al ŝi infanon. Oni ĝojegas. La melankoliaj gurdoj bruegas en pluraj drinkejoj: sed tamen la akordionoj regas. Ĉiuj drinko-majstroj dungis akordioniston kiu dancigas la ĉeestantaron. Li nur interrompas sian ludadon por engluti glasegon da forta biero aŭ glas-eton da juniperbero. Dancu! Ĝoju! Estas la Kristonasko!

Li sidas apud la hejtilo. La krioj, ridoj kaj bruado de la festego atingas lin kvazaŭ insultmokoj. Kiam oni suferas, oni opinias ke la aliaj, kriantaj kaj ridantaj, krias kaj ridas intence por montri sian kon-tenton pro nia suferado. Ha! la homa koro. La aliulaj ridoj estigas niajn larmojn kaj subite la malĝoj-larmoj fariĝas koler-larmoj. Oni koleras kontraŭ ĉio, kontraŭ ĉiuj, sed precipe kontraŭ tiuj kiujn la

malfeliĉego ne trafas. Sed la kolero estingiĝas; la larmoj fariĝas pli oftaj. La pasinto denove aperas kun teruriga precizeco.

La pasinto! La milito!

II

La infanaĝo! Kiam libere oni kuras tra la vastaj kampoj, kiam oni ruligas sin sur la verda herbo, kiam oni ludas, ĉiam ludas... Poste, kiam dudek jaroj forpasis, oni kelkfoje rememoras pri tiuj ĝojaj tempoj (ĉefe kiam oni treege suferas, oni pensas pri tiutempaj ĝojegoj). Oni revidas en sopira revo la dikventran instruiston kun sia duonbasa voĉo, kun siaj okulvitroj sur sia ruĝa nazego... Kaj kiajn farsojn oni faris al li! Kiam en lian inkujon oni metis dikan majskarabon, kiam oni kaŝis lian ĉapelon! Liaj bluaj koleroj ankaŭ aperas al ni, sed iom malpli timigaj. La lernejo estis bela ĉambrego, ornamita per multaj lernigaj bildoj diverskoloraj. Larĝaj fenestroj permesis al la freŝa aero ondege eniri. Kaj vintre alta hejtilo zumadis varmigante la atmosferon. El la lerneja tempo io vivas pli ol ĉio en ni. Estas la ludoj. Kiel oni bone memoras pri la aropaj ludoj en la vastega korto de la lernejo! Tri maljunaj tilioj etendis siajn plenfoliajn branĉojn ombrumante la tutan korton. Kaj tiam oni deziris esti pli maljunaj. Ĉu la vivo ne estas strangaĵo? Kaj nun en la senfineco de nia sufero, tiuj momentoj aperas al ni kiel fantaziaĵo. Ĉu la infanaĝo ne estas la fantazia parto de vivo nia? Oni bone spertas tion, kiam forlasinte (laŭdezire) la lernejon oni eklaboras. Nelonga tempo estas necesa por pruvi ke oni ĵus estas falinta el la fantazio en la realecon de l' vivo. Kia ŝanĝo!

Sed flanke de la momentoj forpasitaj en la lernejo oni ankaŭ memoras pri sia tiutempa hejmo. Eĉ tiu memoro estas tre vivanta en ni. Ĉiuj objektoj, eĉ la plej malgravaj, konservas sian formon en nia spirito. Ekzemple: la horloĝo kies montriloj estis iom malrektaj, la seĝo truita, la kafokruĉo multenhavanta, la spegulo fendita...

Arturo pensas pri la beleta farmobieno aparteninta al liaj gepatroj. En apuda arbareto li ofte iris ludi. Kiel li amuziĝis kiam li prenis fringojn per kaptilo! Se la kaptita birdo estis ino, li forlasis ŝin; sed kiam estis vira fringo, tiam li ĝojege saltis. Ho! la birdo kantados! Pro kio fari tion? Li pensas pri la muroj per kalko ŝmiritaj, pri la ruĝa tegmento. La bestoj ankaŭ ne mortis en lia spirito. Li plej bone memoras pri la fierega koko postkuranta la klukantajn kokinojn, pri la bojanta hundo Leono, deziranta esti malligita. Pro kio dika ĉeno malebligas ĝin trakuri la senlimajn kamparojn? Kaj subite la bovino Rozo montras sian kapon aŭdigante longan blekon... Multaj aĵoj ankoraŭ...

Li sidas apud la hejtilo. Li ne moviĝas. Liaj obsedaj pensoj malantaŭen rigardas. Sed tiuj sendaŭraj ĝojojaroj pli sentigas la estantan suferon.

Por li la infanaĝo ne estis longa. Kiam li estis dekunujara, oni faris el li brikiston.

III

Multaj metioj estas dolorigaj. Estas neeble ke ekzistas laboro pli laciga ol tiu de la flandra brikisto. Oni devas esti bestiĝinta por plenumi tiuspecan laboregon. Kiam la suno (kiun ni tiel amegas!) plej ege varmigas la tutan naturon, tiuj malfeliĉaj laboristoj devas resti en la plena sunumo apud fornego kuiranta argilon. Tie estas terure varmege. La kutima labortago estas dekduhora, kelkfoje, ĝi estas dekkvarhora. Solan vestaĵon oni ne scias konservi; tutnudaj estas la laboristoj. Virinoj kiuj helpas vicigi la brikojn, ankaŭ estas apenaŭ kovritaj. Inter ili laboras knaboj dekjaraj nenion konintaj antaŭe pri la homkorpaĵo. Estas kompreneble ke tiuj infanoj frumaturiĝas.

Estas fakto facile rimarkebla: preskaŭ ĉiuj brikistoj laborantaj en Francio estas flandranoj. Ĉu tio ne sufiĉas por pruvi ĝis kia grado la malklereco regas en tiu malfeliĉa landeto? Ĉiujare miloj da flandranoj devas forlasi sian hejmon por iri eksterlanden, ĉar ilia lando estas tro loĝata kaj ne havas sufiĉan nutraĵon por ili!

Arturo, la heroo de nia rakonto, ankaŭ fariĝis brikisto. Post kvin jaroj, li estis fortikulo. Ĉiujare li revenis en la landon por tri monatoj dumvintraj. Ĉiuj jupoj deziris lin. Kaj pluraj el ili senĝene provokis lin per flamplenaj rigardoj... Ilia volupta rideto diris la tuton, oferis ĉion kaj petegis la viron. Kia dezirinda viro! Ho! en ama unuiĝo kun tiu Arturo! Jen estis la pensoj de la virinoj. Samtempe en li naskiĝis stranga sento: la amdeziro. Kaj inter la multaj dezirantaj fraŭlinoj li elektis Johaninon la servantinon de la farmisto Panhavanta. Laborema, afablega, bonkora ŝi estis la ideala edzino. Sed tro juna li estis por pripensi tion.

Kiel estis deziriga tiu Johanino. Kia senlima ĉarmo! Kia karno! Je krudulo, kiel nia Arturo, tiu argumento estis efikoplena. Kiam blovondo levetis ŝian jupon, kruroj belformaj montriĝis. Ŝiaj brakoj estis firmaj kaj fortaj kiel tiuj de viro. Kitelo permesis vidi la dikajn mamojn, plenigantajn ĝin. Tra la kitelo oni vidas du dikajn mampintojn. Luma rido briligis ŝian vizaĝon. Vero Johanino estis dezirinda virino. Kia ĝuo estus amaĵi kun tiu karno! La unuan fojon, kiam ili interŝanĝis kison, Arturo estis deknaŭjara. Johanino estis dudekjara. Ĵaluzinda geduo! Duonmorto unuigis ilian ĝuspasmon. Iom poste, Johanino sin sentis graveda; kaj ses monatoj poste Arturo ŝin edzinigis.

Kaj infano venis. Knabo! Neniam Arturo ŝin sentis tiom feliĉa, kiom en tiu momento kiam oni diris al li: Estas knabo!

Mildan nomon oni donis al tiu plensana infano: Karlo. Sed ĉiam oni diris al li: Karlĉjo. Lumplena rideto ofte vizitis la vizaĝon de Karlĉjo. Oni estus dirinta: Jen estas infano naskita por esti feliĉa kaj feliĉiga.

Sed ho ve!

IV

Li sidas apud la hejtilo. La feliĉa tempo ĵus pasis en lia memoro; kaj, nun, kio restas el tiu feliĉo, el tiu bela kaj bona Johanino? El tiu plenĉarma Karlĉjo kaj el lia loga rideto?

Li ne moviĝetas. Li restas, la kapo inter la pugnoj, la rigardo fiksata al la poto de la hejtilo, pensante pri la terura kaŭzo de lia suferado: L a M i l i t o. Ha! tiu milito, tiu kruelega milito, ellaboraĵo de tiuj kiuj grase vivadas en brilegaj palacoj kaj kiuj ne kapablas ami iun Johaninon aŭ adori iun Karlĉjon! Ha! Senkoraj krimuloj. Multforma sento ekkaptas lin; revolucia ondego ŝveligas liajn vejnojn. Li ne svingas sian dikan pugnon sed ... li ploras. Tro vasta, verdire senlima, estas lia malfeliĉo ... Lin forlasis la nepra energio. Plori! Li nur scias plori.

— — — — — — — — — — — — —

— Ho! morto venu min falĉi.

— — — — — — — — — — — — —

En salika lulilo ripozis la karno de lia karno. Sesmonata ĝi estis, kiam atingis lin la ordono de la Milita Ministrio, deviganta lin tuj sin direkti al Antwerpeno por soldatiĝi.

4-an de aŭgusto 1914. Ha! neevitebla tago. Ĉu Dio ekzistas? Se jes, li estas monstro por toleri tian tagon.

Ĉiuj preĝejoj aŭdigis la funebran sonoradon. Al la standardoj! oni kriadis. Kaj la maljunaj incitis la junulojn ... Sed! ... La patrinoj, la edzinoj, la fianĉinoj forlasotaj ploris ...

Defendi sian patrujon! jen la kutimaj vortoj. Kaj oni obeas ... kantante por ne ploreksplodi.

Ha, terura momento!

Pro kio? pro kio? Baldaŭ sango ...

Kaj la patrinoj, la edzinoj, la fianĉinoj, la infanoj kondukas siajn filojn, edzojn, fianĉinojn, patrojn al la stacidomo. Ĉiuj kunportis multajn manĝaĵojn, vestaĵojn ktp.

Neforgesebla estas por ni tiu horo, tiu horo de la adiaŭoj. Oni krias diversloke: — Atentu! Skribu ofte! Ili ne respondas.

Tut, tut... La vagonaro foriras... Ĉiuj svingas sian naztukon... kaj poste per ĝi oni sekigas la plenlarmajn okulojn.

Johanino, portanta sur sia brako Karlĉjon, ankaŭ estas tie. Adiaŭon!

Plennuba estas la estonto ŝia.

V

Multaj, kiuj ne vidis la abomenindan militon, parolas pri ĝi per elokventaj vortoj. En la lernejo, oni ankaŭ lernigis la historion de l' popoloj per libroj nur enhavantaj mensogojn. Ĉiam temis pri la patriotismo, pri la gloregaj bataloj, ktp. Ĉu Aŭsterlitz, Waterloo, Sebastopol ne ĉiam aperis al ni kiel grandaj venkoj aŭ admirindaj venkoj? La nomo de tiuj batalejoj estas kvazaŭ glorkronitaj. Oni ne raportis al ni pri la egaj suferoj de la batalantoj tiutempaj. Ĉu vi, kamaradoj el Germanio kiam vi estis lernantoj, ne konsideris la militon de 1870—1871 kiel gloraĵon? Oni donis al vi la lernigajn verkojn de la naciistaj poetoj, kantantaj la belajn heroaĵojn. Sed vi ne legis la admirindan verkon de la majstro Camille Lemmonier: "La Kadavrejoj", temantan pri 1870 kaj pri Sedan. Ĉu vi, francaj kamaradoj kiam vi sidis en la lernejo ne ĉiam enkore estis flatitaj pro la franceco de Napoleon? Oni ne donis al ni la legindajn verkojn de la granda Victor Hugo. Oni ne povas venenigi la spiritojn per tiaj verkoj. Pli bone taŭgas por tio, la verkoj de Barres kaj aliaj.

Sed 1914 pruvis tiun skandalan hipokritecon. Kaj ni, vidintoj de tiu monda dramo, konscias pri la fakto. Heroaĵoj ne plu ekzistas por ni! Sed ĝis la vivfino fluegos antaŭ niaj okuloj sangrivero! Tiuj riveroj kiel Yser, Meuse ktp., ne plu enhavas laŭ ni akvon, sed sangon. Ĉiam en nia memoro vivos tiuj kadavraĉoj apud kiuj ni restadis en la profundaj tranĉeoj. Ha! tiu milito, tiu kruelega kaj maljusta milito.

"Milito" estas vorto ne taŭganta por kvalifiki barbaraĵojn de 1914 ĝis 1918". Kvarjara krimado apenaŭ sufiĉas.

Ni, batalintoj estas nenio. Sed vi senkuraĝaj generaloj, kaj princoj aŭ reĝoj, vi, senkoraj superaj oficiroj estas ĉio. Neniam vi batalis. Dum ni mortadis en la batalejoj, vi festadis en la grandaj urboj. Vi laŭjustece ricevis multkolorajn dekoraciojn. Viaj nomoj brilos en la historio, ankaŭ glorkronitaj. Vi, kies titoloj estas caroj, imperiestroj, reĝoj vi, ĉiulandaj generaloj, — vi estas nur krimuloj. Sed oni vin konsideras kiel heroojn. Ni nur estas sennomindaj bestaĉoj. Vi prenis ĉion el ni. Vi prenis de ni nian liberecon, nian vivamon, nian ĝojon.

Malbonon al vi, malhomoj!

Li sidas antaŭ la hejtilo. Tiuj pensoj kaptas lin. Sed subite liaj larmoj fariĝas ploregoj. Edzino mia! Karlĉjo!

VI

Kiam la vagonaro estis forportinta al Antwerpeno ĉian karan Arturon, Johanino rehejmiĝis. Kiel malplena estus la domo estonte! Kaj ŝia senlima amo al Arturo kuniĝas kun tiu al ŝia infano kreanta egan forton. Ŝi laboregos por ebligi al sia infano vivi, ĉar ne ekzistas monprovizo. Cetere tiu milito ne estus longa.

Sed apenaŭ du semajnoj post la militdeklaro, la unuaj germanaj soldatoj eniris en la vilaĝon.

Vortoj, por priskribi la kruelegaĵon, kiu tiam okazis, ne ekzistas.

— — — — — —

La soldatoj rajdantaj, tenis en la mano siajn ŝargitajn revolverojn. Subite kuglo direktita el iu fenestro atingis je la kapo la komandanton. Mortinta li estas.

Kia skandalo!

La leŭtenanto ordonas halti. Li venigas la urbestron kaj devigas lin kunigi ĉiujn loĝantojn el la dek domoj el kiuj konsistis la kvartalo. Oni bruligas la domojn. La loĝantoj ĉiuj devas esti mortpafitaj. Nur la infanoj restos.

Oni laŭvicigas tridek personojn. Dek soldatoj devas ilin mortigi. Du el ili rifuzas plenumi la ordonon. Oni tuj mortpafas tiujn du heroojn, tiujn verajn heroojn! Kaj poste oni mortpafas ankaŭ tridek personojn, malgraŭ la petegantaj krioj de la sendefendaj virinoj kaj de la okdekjaraj maljunuloj.

En kazernon!

L. IVN

Ne pafu, frat', ne pafu senkonscie!
Ja via pafo celas al la frat'.
Li serĉas panon kaj liberon ĉie,
Lin pelas ĉien skurĝo de malsat'.
Ne pafu, frat'!

Kaj antaŭ ol ekstreĉi vian ĉanon
Por sendi kuglon al ekspluatat',
Pri via famili', pri ĝem' infana,
Vi rememoru, kara kamarad'.
Ne pafu, frat'!

Se verŝos vi eĉ unu sangoguton,
Se falos frat' pro bajoneta bat',
Respondu: kiel, kiel ĉi-konduton
Pravigos al gepatroj vi, soldat'?
Ne pafu, frat'!

Ja venos tempo, kiam mankos ploro,
Plu ne minacos cima kazemat'.
Sed ke ĝi venu, tiu tempo ora,
Ekspluatistan aron sen kompat'.
Ekpafu, frat'!

Johanino falis. Ŝi estis mortinta.

La junan Karlon oni metis en infanejon, en apuda vilaĝo. Sed pro nesufiĉaj zorgoj li mortis post du jaroj.

Nur en februaro 1918, Arturo sciiĝis pri la malfeliĉa sorto de sia karaj edzino kaj infano.

Kaj nun li estas tutsola en tiu ĉi mondo. Sola apud tiu hejtilo, dum la aliaj ĝojegas, drinkas, amuziĝas, amaĵas...

En la apudaj drinkejoj oni bruegas, oni dancadas. Junaj kaj maljunaj amuziĝas. Oni ne forlasu sian parton al la hundoj.

Estas kristnaska vespero... Arturo leviĝas:

— *Pro kio mi ankoraŭ vivus?*

30-an de novembro 1924.



Vivi en mizero ne toleru sklavo

KARL JOHANSSON

Sonas tra la mondo vokoj pri batalo.
Vokas patriotoj nur al rabmilit'.
Burĝaj mastroj ŝtelas per la kapitalo
Kaj sen laboremo krias pri profit'.

Sed ne pri rabado vokas laboristoj.
Ili vokas homojn por justeca cel',
Al heroa ago kontraŭ la rabistoj,
Kontraŭ hombuĉadoj kun fripona ŝtel'.

Estas proletaro, subpremata maso,
Kiu ekstariĝu al la fina ag',
Ag' por liberiĝo de l' labora klaso,
Por pli luma mondo, por pli hela tag'.

La estonta mondo estu pli por paco
Kaj por laboranto, sed ne por sinjor'.
Al rabanta burĝo ne troviĝu spaco,
Loko de profito sen okup', labor'.

Vivi en mizero ne toleru sklavo,
Ne toleru batojn ĉiam kun sufer'.
Tial jam kuraĝe levu sin por savo
Ĉiu subpremato de la tuta ter'.

Vaste do eksonu vokoj pri ribelo:
Subpremat' stariĝas al bravega far'.
Tremu subpremantoj, en palac', kastelo.
Rompos siajn ĉenojn fine la sklavar'.



LA POSEDRAJTO

AUGUST STRINDBERG

Bela avelarbo staris en la arbaro. La aveloj estis maturaj, kiam alvenis tien sciuro en brila tago de aŭgusto.

— Tiu ĉi estas mia avelarbo — diris la sciuro al si mem kaj eksaltis sur branĉon por provi siajn dentojn kontraŭ la delikatajn fruktojn.

— For de tie ĉi, ŝtelisto! — estis aŭdata malforta voĉo el la interno de la arbo.

— Kiu estas? — ekkriis la sciuro kaj rigardis ien kaj tien.

Baldaŭ ĝi ekvidis muson ĉe la malsupro de la arbo.

— Foriru, kaj lasu miajn avelojn! — rediris la muso.

— Ĉiajn avelojn? — rikanis la sciuro kaj ekatakis ilin sen ĝeno tiom, kiom ĝi kapablis.

— Lasu ilin, ŝtelisto!

— Per kia rajto, se mi demandu, apartenas tiu ĉi arbo al ci?

— En nomo de "jus primi venentis", t. e. per la rajto de la plej frua alveninto.

— Tre bone, sinjoro, kaj mi proprigas al mi la arbon en nomo de "jus primi occupantis", t. e. per la rajto de la plej frua okupinto. La forto estas pli valora ol la rajto. Mi estas plej forta, do mi havas pli bonan avantaĝon ol ci, ci komprenu!

— Kion vi tie faras? — ekkriis la garolo, allogita de la bruo. — Lasu miajn avelojn, aliokaze vin mi atakos!

— Pardonu, sinjoro, — respondis tuj la sciuro: — sed estas mi, kiu jus eltrovis la arbon.

— Ke ci eltrovis mian arbon, tion mi povas kredi, sed, per kia rajto ci proprigis al ci ĝin?

— Mi ekokupis ĝin en nomo de...

— Ci tute simple ŝtelis ĝin. Kaj nun mi venis kaj reprenas ĝin. En sama momento, kiam la garolo intencis ataki la sciuron, falis densa ŝtonetmaso ĉirkaŭ la batalantoj, kiuj rapide forkuras.

— Tiaj kanajloj — kriis la knaboj, kiuj venis por kolekti avelojn — nun ili havas nenion por siaj klopodoj.

Kaj la knaboj komencis ŝuti avelojn en siajn ĉapojn.

— Mi kredas, ke oni amuzas sin inter la arboj, — grumblis la farmulo, kiu nun ekaperis sur la lokon. — Allasu, sinjoroj, ŝtelistoj, ke mi klarigu por vi, tiel ke viaj opinioj pri la privata posedrajto ne deflankiĝu.

— Belaj vergoj, tiuj ĉi! — interrompis lian parolon la kaporalo, kiu alvenis kun la patrolo, kaj levis sian hakilon. — Estas tio, kion ni bezonas por fari la fasĉinojn.

— Haltu tie! — kontraŭdiris la farmulo.

— Ĉu vi eble estas la posedanto? — demandas la kaporalo. — Ne, tiu vi ne estas! Fermu do la buŝon de vi!

— Sed mi estas la farmanto.

— Plue! Vi ne havas mem rajton forhaki tiun ĉi arbon, sed tiun rajton mi havas.

— Ĉu la leĝoj pri la posedrajto eble estas nuligitaj? — demandis la farmulo.

— Por tiu ĉi fojo, mia bona viro: dum armadoj silentas la leĝoj, kaj se vi volas akompani min ĝis la sinjoro posedanto, mi montros al li la rekvizician instrukcion. Jen estas ĝi.

Ili iras; sed apenaŭ ili estas for, tuj fervoja nivelisto ekaperas kun aro da laboristoj.

Li starigas sian nivelilon, faras kalkulojn, celdirektas, skribas notojn kaj disdividas la laborojn.

— Nun ni rapidos proprigi al ni la avelojn! — murmuras la knaboj.

— Mi faras rekvizicion! — babilas la garolo.

— Nun ne diru ke ekzistas posedrajto! — pepas la muso.

— Bone, sinjoro! Bonvolu!

Kaj la posedanto iras, kontenta je tiu klarigo.

— Leĝa uzurpo en la privata posedrajto, estas tio ĉi! — diras la kaporalo.

— Per la rajto de la lasta alvenintó! — ekdiras la farmulo.

— Forhaku la arbon tie, komence! — li diras.

Dirite kaj farite.

— Per kia rajto vi allasas al vi fari arbofaligon? — demandas la sinjoro posedanto, kiu alvenis la lokon.

— En nomo de la leĝo pri elproprigo.

El la sveda lingvo tradukis K. J.



LA ALMOZULO

Mi iris malsupren sur la straton. Malriĉa, avida maljunulo haltigis min. Ruĝaj, larmantaj okuloj, malhelbluaj lipoj, ĉifona vestaĵo, malpuraj ĉifonoj.

Ho, kiel terure juĝis la mizero tiun ĉi malfeliĉan kreaĵon. Li etendas al mi sian ruĝiĝintan, ŝvelintan, malpuran manon... li ĝemas, li tremas por helpo.

Mi komencis ĉiujn miajn poŝojn traserĉi... sed nek monero, nek horloĝo, eĉ mia poŝtuko ne estis ĉe mi... nenion mi kunportis.

La almozulo atendas plu... kaj lia antaŭen etendita mano tremas pro la malforteco.

Serĉante kaj hontante mi ekprenis per forta premo lian malpuran tremantan manon...

— Ne koleru, frato, mi nenion havas ĉe mi, frato mia!

La almozulo direktis siajn brulantajn okulojn al mi; rideto venis sur siajn palajn lipojn — kaj ankaŭ li kaptis miajn malvarmajn fingrojn.

— Lasu la almozon, frato! — diris li mallaŭte: — Ankaŭ pro tio mi estas dankema al vi! Tio ĉi ankaŭ estas donaco, mia frato!

Tiam mi sentis, ke mi ankaŭ ricevis donacon, de mia frato!

El la germana libere tradukis Eŭgeno Benedikt (6913), Wien.



MIA VIOLONO

C. F. MAGASHAZI-HOCHHAEUSER

Mia violono estis mia amiko apud miaj kamaradoj. Kiam ni troviĝis sur la barikadoj en fajroza batalado por la Libero, mi tiam mian amikon tute forlasis. Mi ĝin tute forlasis, ĉar nun la kugloj anstataŭis la muzikon, kiun ĝi estis liveranta; forlasis — ĉar la kugloj ja preludis... Antaŭ la sturmo ĝi sin aŭdigis — mia violono de l' klasbatalo, de l' batalo por Libero.

Estis paŭzo. Ni bezonis ripozon. Kaj tiun ripozon eluzis mi per mia violono . . . Kiel vigle — kiel fajre mia amiko apud la batalkamaradoj, mia violoneto ludis — kantis:

"Varsovianino"... "Ruĝa Standardo" — kaj "Fratoj al sun'"... Ni aŭdis flirti la ruĝkoloran drapon en la aero — efektive: ni aŭdis flirti... La ruĝan standardon en la aero.

* * *

Kiam ni — mia violoneto kaj mi — vidis, ke la kamaradoj volis ripozi — por kolekti forton al batal' pro la libero, ke ili volis dormi kelkminutaĵon, mi — ni preludis la Funebran Marŝon — tiel ke ni vidis vizie la mortigitajn de l' malamiko kamaradojn... Estiĝis kvieto. Silento. Dormiga silento. Ni kune ekdormis, mia violoneto kaj mi.

Kaj krom la postenoj ĉiuj ni dormis — la dormon de batalantoj! Ĝis nin "vizitis" kapitalbombo — fia bombaĉo, kiu trafis ne nur min, sed, krom kelkajn kamaradojn, ankaŭ mian amikon apud la kamaradoj — la violoneton — tiom senkompate, ke ĝi estiĝis kriplaĵo — kriplaĵo por ĉiam... Ĝi meritus Funebran Marŝon, mia violoneto, l' amiko apud miaj batalkamaradoj!



LA MARO

TAGULO

Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas
Vi, maro, ĉe ŝtona deklivo.
Kiel fingroj la ondoj eterne
Harpadas la fugon de l' vivo.
Ĉiu rok' estas kordo
En via harp', la marbordo
Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas.

Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas
Vi, maro, en paco kaj ĝojo.
Vi harpas ĉielan arion
El la libro de Lakta la Vojo.
Ĉiu rok' estas kordo
En via harp', la marbordo
Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas.

Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas...
En viaj okuloj, ho maro,
Rebrilas la kanta notaro
Dum vi ludas el Lakta la Vojo.
Ĉiu rok' estas kordo
En via harp', la marbordo
Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas...

Plaŭdegas, plaŭdegas, plaŭdegas!
Uragano per fulmo kolera
Vipadas la pluvan ventegon;
Kun la tondro vi muĝas kantegon,
Unu kosman peanon al sorto.
Jen muziko timiga, mistera,
Pri ŝanĝiĝo, naskiĝo kaj morto...
Ĉiu rok' estas kordo
En via harp', la marbordo
Plaŭdetas, plaŭdetas, plaŭdetas...

(Verkita originale en malliberejo.)



RIDINDA PLORO

HRISTO BOTEV[1])

Ploru por Parizo, la ĉefurbo de l' diboĉo, de la civilizacio, la skolo de l' spioneco kaj sklaveco; ploru, filantropoj, por la palacoj de l' teruraj vampiroj, de l' grandaj tiranoj — por la monumentoj de l' malsaĝeco, de l' barbareco, konstruitaj per la dehakitaj kapoj de tiel multaj Profetoj, de tiel multaj grandaj pensuloj kaj poetoj, per la formordetitaj ostoj de tiel multaj martiroj por la ĉiutaga pano, — ploru! — La frenezulojn neniu ja povas konsoli, la furiozulojn neniu povas kvietigi!

Malbenu la komunistojn, kiuj detruis vian ĉefurbon kaj formortis kun la rabistaj por vi vortoj: *liberon aŭ morton, panon aŭ kuglon!* Kraĉu sur iliajn kadavrojn kaj sur la kadavrojn de tiuj viktimoj de l' civilizacio, kiujn vi ĉirkaŭprenis kaj ĉirkaŭprenas en la persono de viaj edzinoj, de viaj fratinoj, de viaj patrinoj, kaj hodiaŭ vi nomas ilin furiozaj malĉastulinoj, pro tio ke ili havis ankoraŭ forton ekkapti la armilojn kaj savi sin de l' kloako de l' diboĉo. Ĵetu koton kaj ŝtonojn sur la tombon de Dombrovski, ĉar li ne estiĝis servisto de iu kronita kapo, sed batalanto por granda ideo, por granda celo kaj per brusto ekstaris kontraŭ la perfiduloj de Francio kaj kontraŭ la kulpuloj de tiel multaj malfeliĉaĵoj en la mondo.

La tuta mondo priparolis Parizon, la tuta mondo malbenis la komunistojn, ankaŭ nia kompatinda ĵurnalistaro, ankaŭ ĝi ne restis malantaŭe, ankaŭ ĝi ekploris por la senspirito kaj malbenis la racion. Ridinda rido! Kvazaŭ de Nimvrodo ĝis Napoleono, de Kambizo ĝis Vilhelmo la milito ne prezentas samajn spektaklojn, saman celon per samaj rimedoj. Kvazaŭ Napoleono, en la nomo de l' civilizacio, kaj Vilhelmo, en la nomo de l' dia providenco, ne faris pli multe da malbono, ol, ekzemple, Aleksandro Macedona per siaj militiroj antaŭ multaj jarcentoj. Sed tie estas la barbareco, tie estas la riproĉoj, kie la sklavo, la homo, kiam oni ne aŭdas liajn parolojn, lian racion, kaptas la ekstremon kaj batalas por vivo kaj morto kiomgrade al li permesas liaj fortoj, kiuj estas malnoblaj, ĉar estas malgrandaj kaj malgrandaj nur pro tio, ĉar la majstroj ilin forrabis. Tiam la homon oni nomas rabisto, diboĉulo, malnoblulo kaj barbaro! Tiaj estis ankaŭ la komunistoj.

La kristanismo havis siajn martirojn ĝis kiam nomigis la sklavon "filo dia, filo homa"; havas ilin ankaŭ la revolucio por "fari la vagulon civitano"; havas kaj havos ilin ankaŭ la socialismo, kiu "deziras fari la homon pli ol filo dia kaj civitano — ne idealo, sed vera homo, ke de li dependu la urbo, ne li de la urbo". La kristanismo, la revolucio kaj la socialismo — la monarkio, la konstitucio kaj la respubliko — ili estas faktoj kaj epokoj historiaj, kiujn neos nur tiu intelekto, kiu ne konsideras la progreson de l' homaro.

---

[1]) Biografian skizon pri H. Botev vidu en "S. R." n-o 1-2 (37-38) n. j., pĝ. 10. La enpresata artikolo estas verkita de H. Botev post sciigo pri renverso de Pariza Komuno. *Red.*

La lernejo kaj nur la lernejo, diras avino *Makedonio*[1]), savos Eŭropon de sociala renversiĝo, — la lernejo kaj nur la lernejo, ripetas ni, preparos ĝin por tiu renversiĝo; sed ne la lernejo de Zlatousta[2]) kaj Lojala, de Vilhelmo kaj Napoleono, sed tiu de Furie kaj Prudon, de Kjuvie kaj Njuton — kaj nepre la lernejo de l' vivo.

La komunistoj estas martiroj; ĉar ne estas gravaj la rimedoj en ilia batalo por libero, sed la ideo en tiu batalo. "Ankaŭ la libero havos siajn jezuitojn", — diras Heine.

Detenu nun siajn larmojn nia ĵurnalistaro, kiel detenos ilin ankaŭ la eŭropa — por priplori aliajn ĉefurbojn, kiam la sklavo ekkrios al sia mastro: kiu estas vi, kiu ploras? Ĉu viro vi estas, ĉu virino aŭ hermafrodito — besto sovaĝa aŭ fiŝo?... *Kaj estos tago — tago unua*...

El bulgara *Stebek*.




[1]) Tiama bulgara ĵurnalo elirinta en Konstantinoplo.
[2]) Zlatousta — or-buŝa.

 **ARTO** 

LUDOVIKO BEETHOVEN 1770—1827

E. BRAŬDO

En unu el germanaj muzikgazetoj estis presita antaŭnelonge tre interesa artikolo pri tio, kiel la laboristoj de Vieno perceptas la muzikon. Evidentiĝis, ke plej senpere kaj forte la proletarian aŭditorion efikas la muziko de Beethoven kaj speciale liaj simfonioj. Li certe ne estis ĝenerale unua



komponisto, kiu verkis simfoniojn. Sed, kompare kun la majstroj de la antaŭaj epokoj, li atingis tian admirindan forton de l' esprimivo, ke neniu el ili povas eĉ elmalproksime kompariĝi kun lia kapablo organizi la artkonscion de la masoj.

Beethoven naskiĝis sur la sojlo de la grandaj eventoj (okazaĵoj), ekscitiĝintaj la tutan tiaman Eŭropon, la 16-an de decembro 1770, en la urbo Bonn. Kiel deknaŭjara junulo li estis atestanto de la unuaj revokoj de la

Granda Franca Revolucio en sia lando. La tiutempa Germanio ne estis entirita en la torenton de la revoluciaj okazaĵoj kiel Francio, sed ni posedas multajn pruvojn, ke inter la progresema germana inteligentularo, al kiu apartenis ankaŭ Beethoven, kreskis kaj firmiĝis la malamo al aŭtokratio de la bienposedantoj kaj princoj, en kies manoj estis la tuta tiama Germanio.

Dum la tuta daŭro de la muzika kreado de Beethoven estas klare sentata la influo de la mondeventoj, kies atestanto li estis en sia junaĝo. Veninte anstataŭ la muzikistoj de kripla kortega lukseco, Beethoven unua havis kuraĝon diri, ke la muziko estas rimedo de socia edukado, sed ne nur de agrabla ĝuo. Li senfine larĝigis ĝian esprimivon kaj faris ĝin kapabla interpreti grandan socian enhavaĵon. En unu el siaj plej bonaj verkoj, en la "Heroeca simfonio", Beethoven montris moviĝon de la masoj irantaj por konkero de sia libero, li sonigis en ĝi ferajn ritmojn de grandiozaj tutpopolaj funebraj procesioj kaj venkajn revoluciajn fanfarojn. Sian naŭan, la lastan, simfonion, verkitan je du jaroj antaŭ la morto, Beethoven konkludas per himno de ĝojo, realigante la plej amatan revon de sia vivo — krei la muzikon proksiman por la milionoj. Kiel teksto de tiu ĉi konkluda parto servis la poemo de la granda germana poeto Schiller "Al la libero", kies titolon, pro cenzuraj konsideroj, necesis renomi "Al la ĝojo". Ideo pri tiu ĉi himno venis jam al la juna Beethoven kaj ĝia definitiva efektivigo estas dividita de la unua intenco per tutaj tridek jaroj.

Ne malpli gravan signifon por la mondkulturo havas la verkoj de Beethoven, skribitaj por apartaj instrumentoj kaj por kombino de du, tri, kvar (tiel nomata "kamermuziko"), kaj ankaŭ lia sola opero "Fidelio". Tiu ĉi muziko eble estas malpli konceptebla por la masaŭskultanto ol la simfonioj de Beethoven. Sed ankaŭ tie ĉi Beethoven atingas neokazintan antaŭ li helecon de l' esprimivo, kaj estus ekstreme dezirinde, ke la masaŭskultanto dum la centjarjubilea Beethoven-solenado ekkonu almenaŭ la plej fortajn specimenojn de liaj fortepian-sonatoj kaj de la plejamata de Beethoven speco de la kord-kvartatoj, t. e. de la verkoj por kvar arĉokordaj instrumentoj.

La epoko de Beethoven donis en lia persono la plej helan kaj pasian espriminton de la heroismo en la batalo por realigo de la plej libera reĝimo de la sociaj kaj kulturaj interrilatoj. La klaso lin antaŭmetinta kondamnis Beethoven al soleco, en kiu pasis liaj lastaj jaroj. Ankoraŭ en la mezo de la XIX. jarcento la verkoj de Beethoven, precipe liaj lastaj simfonioj kaj kvartatoj, ŝajnis limo de muzika arógo kaj estis tute ne konsiderataj, kiel koncepteblaj. Nur dum la lastaj kvindek jaroj lia muziko fariĝis efektive posedaĵo de la masoj. Nia epokó — atestanto de la plej granda revolucio — senlime vastigos la amplitudon de la Beethoven-muziko, veniginte al ĝi la muzike orfajn ĝis nun socitavolojn.

Trad. *Vincent Milk.*



 **LINGVOSCIENCO** 

LA SKEMO DE LINGVA EVOLUO[1]

E. SPIRIDOVIĈ

Ni skizas jenan skemon de lingva evoluo:

1. La epoko de popolaj dialektoj.
2. La epoko de naci-literaturaj lingvoj.
3. La epoko de helpa lingvo internacia (HLI).
4. La epoko de universala lingvo internacia (ULI).

Unuan fojon la skemon (sen la 4-a epoko) ni trovas ĉe L. Zamenhof, kiu, ne estante marksano, tamen genie palpetrovis la ĝustan linion de lingva evoluo — el popolaj dialektoj trans naci-literaturaj lingvoj al HLI, kies helpa karaktero estas difinita ankaŭ de li. Pli malsupre ni citas lian "*Aldonon al la Dua libro*", kie li analogias la formiĝon de HLI sur la grundo de naci-literaturaj lingvoj je formiĝo de la lastaj sur la grundo de "dialektoj kaj provincismoj"[2]):

"Por la lingvo internacia la fundamento (de Esperanto. *E. S.*) reprezentas tiun lingvan materialon, kiu estis por ĉiu moderna lingvo en la komenco de skriba literaturo. Estis jam gramatiko kaj sufiĉa kolekto da vortoj, sed multo ankoraŭ malestis, multaj vortoj kaj esprimoj. Tiuj-ĉi vortoj estis kreataj unu post unu, laŭ la kreskanta bezono, kaj malgraŭ, ke ili estis kreataj dise de malsamaj personoj, sen ia kondukanto aŭ leĝdonanto, la lingvo ne sole ne disdividiĝis, sed kontraŭe, ĝi ĉiam pli unuformiĝis, la dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis antaŭ la fortiĝanta komuna literatura lingvo."

Ĉi-tie tre grave estas noti, ke Zamenhof bonege komprenas, ke la plua evoluo nepre kondukas al unueco, sed ne al disiĝo de la lingvo.

Memkompreneble, oni povas nomi la epokojn de la skemo nur ideale: la vivo prezentas senfine komplikan bildon de la lingva evoluo de diversaj homaj grupoj, vivantaj en plej malsamaj kondiĉoj kaj starantaj sur malsamaj gradoj de la kulturo. Sed la ĝenerala linio de lingva evoluo estas bone montrata de la skemo.

La ĉefaj tendencoj de lingva evoluo el epoko al epoko estas jenaj:

La lingvo evoluas:

1. *El diseco al unueco.* La tendenco estas kunligita kun la ĝenerala tendenco de la homa evoluo: el soci-ekonomia diseco al unueco en la monda skalo.

2. *El malkonscia al konscia lingvokreado,* aŭ, kio estas la samo, el la "natura" al la arta. Ĉi-rilate oni povas prezenti (certe, treege kondiĉe) jenan skemon:

---

[1]) Vidu "S. R." n-rojn 3 (39) kaj 4-5 (40-41).

[2]) Specialan artikolon dediĉis al tiu ĉi skemo K-do Zilberfarb ("La Nova Epoko", n-o 1, 1922).

	Elementoj malkonsciaj	Elementoj artaj
1. La epoko de popolaj dialektoj	100%	0%
2. La epoko de naci-lit. lingvoj	70%	30%
3. La epoko de HLI	30%	70%
4. La epoko de ULI	0%	100%

3. *El komplikeco al simpleco.* Kvankam la lingvoj en sia fundamento ĉiam havas ian pli-malpli regulan konstruskemon, tamen multegaj jarmiloj da malkonscia evoluado sekvigis ekstreman komplikiĝon kaj senordiĝon de ili. La plua evoluo kondukas al ĉiam pli granda ordiĝo kaj simpliĝo dé la lingva strukturo. Ĉi-rilate HLI estas la fenomeno ankoraŭ tre malproksima de l' idealo.

4. *El malriĉeco al riĉeco.* Kune kun pli simpliĝo de la strukturo la lingvo pliriĉiĝas. Oni povas diri, ke la lingva pliriĉiĝo estas renverse proporcia al ĝia plisimpliĝo. Tamen ĉi-tie oni devas rimarkigi jenon: samtempe kun pliriĉiĝo okazas ankaŭ formortado de konceptoj kaj nuancoj de konceptoj, tute ne necesaj en pli kultura socio. La ebloj de pliriĉiĝo kaj plifaciliĝo de la homa pensado pro ĉiam plia perfektiĝo de la teknika strukturo de la lingvo estas tute nelimigeblaj. Ĉiam plia liberiĝo el malkonscieco en la lingvo finfine forigos tiun kontraŭdiron, kiun, ekz., ni havas niatempe en la teknika malprogreso de naci-literaturaj lingvoj pro kresko de riĉeco de konceptaro (kaj, entute, de pensado): oni estas devigataj esprimi multegajn konceptojn ĉu kondiĉe, uzante alisence jam ekzistantajn vortojn, ĉu priskribe, ĵonglante en la katenoj de teknika malriĉeco kaj rigideco de la lingvo, havanta ankaŭ lingvan tradicion, kiu ne permesas utiligi la eblojn jam estantajn en la lingvo.

Ni skizu nun la lingvajn epokojn notante ilian dependecon ĉefe de la faktoroj — ekonomiaj, soci-politikaj kaj teknikaj.

La epoko de popolaj dialektoj. Ekonomie la epoko estas karakterizata per diseco de la naturala ekonomio. La ega diseco de la homaro dum la epoko evoluigas multegon da lingvaj grupoj kun nemezurebla kvanto da idiomoj kaj dialektoj.

Multmiljara daŭro de la epoko de dialektoj, komencante de ekapero de la lingvo kaj finante per la komenco de skribarto, post detala esplorado certe ebligos nomi plurajn subepokojn. Sed ni ĉefe atentas el la vidpunkto de perspektivoj de la lingva evoluo, kaj tial limigas nin nur per la kruda priskizo de l' epoko.

La evoluo de laborilaro praepoke havas karakteron de senkonscia kolektado de sperto. Tial estas nature, ke la evoluo de la lingvo, — la plej ĉefa ilo, iganta la homon esti homo, — por longa tempo konservas la karakteron de malkonscia evoluo. La epoko de dialektoj, entute, por 100% estas karakterizata per la malkonscieco de evoluo.

Eĉ dum la epoko de florado de naci-literaturaj lingvoj, la popolaj dialektoj daŭras ekzisti kaj eĉ, ĉe iuj kondiĉoj, progresi, dum en la mondo ekzistas la naturala ekonomia paralele kun pli progresivaj formoj de la popola ekonomio. En kulturaj landoj la moderna kamparano, nur parte konservanta naturalan karakteron de sia mastrumado, ankoraŭ estigas la bazon de ekzistado de la dialektoj. Tamen, kune kun malestiĝo de la naturala ekonomio, pereas ankaŭ la popolaj dialektoj.

La epoko de naci-literaturaj lingvoj. Treege malrapide, komence tuŝante nur la supraĵon de la naturala socio, progresas la interŝanĝa ekonomio, havanta, kiel sian plej superan formon, la kapitalismon. Kun la progreso de l' interŝanĝa ekonomio la disigitaj antaŭe homaj grupoj kunfluiĝas en ĉiam pli kaj pli grandajn kompleksojn, formiĝantajn fine, en ŝtatojn kaj naciojn.

Ni devas rimarkigi, ke nacioj estas aperantaj nur kun apero de la kapitalismo.

Kunvivado de la antaŭe disigitaj grupoj postulas komunan lingvon. La lasta estas kreata parte per malkonscia kaj parte per konscia, arta vojo. Oni povus supozi la eblon por la formiĝo de nacia lingvo entute per malkonscia vojo, se la interŝanĝa socio progresus kun ekstrema malrapideco. Tamen la relative rapida ekonomia progreso faras kontraŭdiron inter la unueco de l' interŝanĝa socigrupo kaj la diferenceco de la dialektoj, idiomoj, lingvoj. La solvo de la kontraŭdiro estas nur utiligo de la konscia homa volo. De tio dependas la arta, iumezure, karaktero de formiĝo de la nacilingvoj.

La bildo de la formiĝo de la naciaj lingvoj estas tre komplika. Sed la plej tipa formo estas jena:

Unu el gentoj pro favoraj geografiaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj subigas la aliajn. La idiomo de la gento fariĝas fundamento por formiĝo de la nacilingvo. Disvolviĝanta skribarto en la manoj de la suprajo de la dominanta gento donas al ĝia idiomo grandajn avantaĝojn. La skribarto havas solvantan signifon por la konscia (arta) reguligado de la lingvo. Progresas literaturo (komencante de la "sankta skribaĵo"), estas kreataj regulaj formoj de gramatiko, estiĝas selekto de vortoj el diversaj dialektoj kaj lingvoj. La laboro havas tian okulfrapantan artan karakteron, ke eĉ multaj burĝaj lingvistoj (certe, ne la adeptoj de l' arteco) rekte nomas naci-literaturajn lingvojn artaj.

Estante komence nur lingvo de la dominanta supraĵo de la socio, naciliteratura lingvo, laŭ la grado de formortiĝo de la naturala ekonomio, ĉiam pli disvastiĝas kaj fariĝas parola ("viva") lingvo de la masoj.

La bildon de formiĝo de la naci-literaturaj lingvoj lertege skizis L. Zamenhof en la supremetita citaĵo.

La vivo scias pli komplikajn formojn de formiĝo de la naci-literaturaj lingvoj, ol la tipa bildo, skizita de ni. Ekz., formiĝo de la naci-literaturaj lingvoj de l' Okcidenta Eŭropo estis komplikigita per uzado de la latina lingvo, kiel helpa lingvo de la dominanta supraĵo de la socio, dum la antaŭa epoko, kiam en Eŭropo estis pasanta la procedo de formiĝo de la naciaj ekonomioj. La rolo de la latina lingvo, egmeżure arta, en la formiĝo de la naci-literaturaj lingvoj de Okcidenta Eŭropo kaj poste de la tuta mondo estis grandega. Esplorado de ĝi en la lumo de la marksisme lingva teorio estigos la plej gravan taskon.

La epoko de HIL. Jam en la epoko de la financa kapitalismo estas reliefe rimarkiĝanta la alproksimiĝo de la mondo al formiĝo de l' unueca mondekonomio: kun grandega rapideco kreskas la kulturaj kaj produktadaj interligoj, jam estas kontaktigitaj la plej malproksimaj merkatoj de la mondo. Kaj dum la kapitalismo, baraktanta en seneliraj kontraŭdiroj, antaŭ morte konvulsias, la laborista mondmovado akiras antaŭe nekonitan skalon. De la socia revolucio en Rusio komenciĝas la monda transira epoko al socialismo. La neceseco de unueca lingvo por internacia interligo akiras masan karakteron. Precipe bezonas ĝin la klaso de l' estonteco — la proletaro kaj estas kompreneble, ke antaŭ niaj okuloj la movado por LI akiras ĉiam pli kaj pli proletan karakteron.

Sed la lingvo estas nuntempe la plej ĉefa signo de nacio. En la furioza nacia luktado de l' kapitalisma epoko, la lingvo estas standardo. Celado de subpremantaj nacioj asimiligi la subpremitajn estas esprimata antaŭ ĉio per persekutado de lingvo. Pro tio sekvas tro gardema kaj amplena rilato al sia lingvo ĉe la subpremitaj nacioj (la plej labora bazo por la lingva fetiĉismo!). De alia flanko, "neeviteblan kunfluiĝon de nacioj la homaro povas atingi nur

per la transira periodo de plena liberiĝo de ĉiuj subpremitaj nacioj"[1]). La ekzemplon de simila liberiĝo jam prezentas Sovet-Unio, en kiu nun dekoj da nacioj aliĝas al la monda kulturo per evoluigo de siaj naci-literaturaj lingvoj.

Kaj jen antaŭ ni estas kontraŭdiro: de unu flanko, ni havas rapide kreskantan bezonon pri unueca lingvo, kaj de la dua — ankoraŭ daŭrantan progresadon de nacilingvoj. La solvo estas trovita de Zamenhof: dum tiu ĉi epoko la internacia lingvo povas esti nur *helpa.*

Ĉi-tie ni esploru *la teknikan flankon* de la problemo. Antaŭ ĉio ni devas noti la kontraŭdiron inter ĉiam pli rapidiĝanta kresko de la mondekonomia unueco kaj la ekstrema konservativeco de la naci-literaturaj lingvoj (kun ilia lingva tradicio kaj ĝenerala rigideco, komencante de la enviinda por sovaĝuloj ortografio). El tiu ĉi kontraŭdiro sekvas la alia: la pensado niaepoke ĉiam pli internaciiĝas, dum *teknike* la lingvo tre postrestas de la procedo. Kaj, samtempe, la pensado fariĝas nemezureble pli riĉa, ol ĉi-tion povas esprimi rekte, *ne per priskriba maniero,* niaj sovaĝecaj grandampleksaj lingvaj maŝinoj. Tie-ĉi la lingvo, kiel sistemo de pensado, ŝiras katenojn de la lingvo — sia teknika ilo. El tie sekvas la grandiozeco de la lingva revolucio dum la transiro al HLI kaj tial plikreskado de arteegrado en la lasta kompare kun la naci-literaturaj lingvoj estas pli intensiva.

Nun ni starigas la demandon: kiu lingvo fariĝos fundamento de HLI? Jam el ĉio antaŭdirita oni povas kun plena certeco konkludi pri ebleco por neniu el ekzistantaj lingvoj fariĝi la fundamento: tro grandaj estas la naciaj kontraŭdiroj, tro unuflanka kaj arkaika estas la strukturo de ĉiu el naciliteraturaj lingvoj, por ke almenaŭ unu el ili povu fundamentiĝi por la plej granda lingva revolucio!

Ekaperas pli serioza demando: ĉu fariĝos HLI la lingvo Esperanto, aliel dirante, ĉu ĝi estos akceptita de la tuta mondo, kiel HLI? La sufiĉe esperiga respondo estas la 40-jara sukcesega progresado kaj disvastiĝado de Esperanto. La garantio de la sukceso de Esperanto estas ne nur ĝia perfekta strukturo kaj konformeco al tiu grado de arteco, kiu necesas por HLI, sed, niaopinie, eĉ ĉefe, la principoj de evoluo de Esperanto, skizitaj de Zamenhof. El ili la plej ĉefa estas — evoluo de multarta en sia fundamento Esperanto, kiel "viva" lingvo, aliel dirante, tiel same, kiel iu ajn naci-literatura lingvo (la elementoj de malkonscia evoluo en Esperanto estas ankoraŭ grandaj).

Evoluante, kiel viva lingvo, Esperanto el ĉiu nova projekto de LI, el ĉiu efektiva konkero de lingva tekniko elsuĉas ĉion, kio estas en ĝi efektive bona, kaj la restaĵon la vivo forĵetos, kiel elpremitan citronon. Nome tio-ĉi garantias al Esperanto kontinuan perfektiĝadon kaj finan venkon. Estus *danĝero por la venko* de Esperanto, se ĝi laŭ iuj kaŭzoj tiome rigidiĝus, ke preter ĝi komencus pasi tiuj pliperfektigoj de la lingva tekniko, kiuj jam estas eblaj niatempe, kiam jam ekzistas granda laboro pri lingva tekniko de multaj esploristoj. Nia postulo: ĝenerale ĉiu lingvoteknikisto kaj. parte, ĉiu lingvoprojektisto ne povas ne esti laboranto por Esperanto!

La epoko de ULI. La skizita ĝenerala linio de la lingva evoluo devigas, ke ni skizu ankaŭ laŭeble perspektivojn.

La problemo pri ULI antaŭ ĉio postulas solvon de la problemo pri ekzistado en estonteco de nacioj. Spite asertoj de multiuj, ni vidas neniajn motivojn konsenti kun ili, ke la nacioj ne neniiĝos. La produkto de kapitalismo — la nacioj — ĉi-tiu postvivaĵo de jam foriranta en la historion ekonomia disiĝo de la homaro — devas formorti kune kun kapitalismo, klasoj, ŝtatoj. Lenin, kiel ni jam citis pli supre, diras pri "neevitebla kunfluiĝo de nacioj" en la rezulto de "la transira periodo de plena liberiĝo de ĉiuj nacioj".

---

[1]) N. Lenin: "La socialisma revolucio kaj la rajto de nacia memapartiĝo".

Li ne donas eblon por miskompreno de la koncepto "kunfluiĝo" de nacioj, kontraŭstarigante al la koncepto alian koncepton — "kunproksimiĝo" de nacioj, sub kiu li komprenas "neniiĝon de dispartiĝeco de la homaro per etaj regnoj kaj de ĉiu apartiĝeco de nacioj"[1]).

De tie — HLI estas lingvo de la transira epoko de "kunproksimiĝo" de nacioj kaj ULI — la lingvo de la epoko de ilia "kunfluiĝo", de la epoko de komunismo.

Kiome la lingva fetiĉismo estas la produkto de la nacia luktado, tiome la kunfluiĝo de la nacioj en epoko de komunismo neniigas sub ĝi ĉian grundon. Neniiĝo de la lingva fetiĉismo plenece forigos la barojn por la plej supera disflorado de lingvoteknologio. Ekster la lingva fetiĉismo tute sensenciĝos la divido je la konceptoj "malkonscia", "konscia", "natura", "arta", "patra", "fremda" ktp., same kiel estas tute sensenca tiu divido en la moderna tekniko de laboriloj. La lingvoteknologio trovos la vojojn por progresigo de la lingvo ĝis la plej supera grado da konformeco kun logiko, efektivigonte la idealon de malnovaj revuloj pri "filozofia" lingvo.

La lingva rimedaro ankaŭ sendube fariĝos pli riĉa kaj diversa, kaj, evidente, la lango kaj laringo perdos sian monopolon. Multfoje pli granda facileco de ULI kompare kun HLI kune kun nemezurebla riĉeco donos eblon plene liberiĝi finfine ankaŭ de la lingva tradicio.

La liberigita lingvo tute liberigos ankaŭ la menson de la homo por senfina kaj eĉ nesupozebla niaepoke progresiĝo.

Konkludaj vortoj

Niatempe la esperanta movado jam atingis tiun disvastiĝecon, ke oni *ne povas* limigi sin nur per praktika uzado de la lingvo kaj per ĝia propagando. Per tiu ĉi vojo nia movado jam atingis la plej grandajn konkerojn: kolektive estas kreita "viva" internacia lingvo sur la fundamento de la projekto de Zamenhof; tiu ĉi lingvo jam havas egan literaturon kaj gazetaron; tial jam neniu en la tuta mondo povas sen deflankiĝo nei eblecon de "arta" lingvo; Esperanto jam faras grandan praktikan servon.

Nome tial-ĉi nun *estas tempo starigi la taskon pri fina akcepto de Esperanto en la mondo.* Sed por ĉi-tio necesas, ke HLI estu akceptita de la scienco, necesas trovi al ĝi la leĝan lokon en la lingvoscienco. Tamen la dominanta sistemo de la scienco tiun lokon por ĝi tute ne povas trovi. Por la lingvoscienco Esperanto, ekz., estas ne pli ol "surogato", kiel diris rusa akademiano Marr. Trovi en la lingvoscienco, ĉe ĝia nuna stato, lokon por HLI — tio signifas tute renversi ĝin. Tiamaniere, *la privata tasko — science bazigi HLI — kondukas al neceseco solvi la ĝeneralan taskon pri la konstruo de la nova, marksisma lingvoscienco.*

Ĉi-tiu grandega tasko postulos egan fortostreĉon de ĉiuj marksanoj — adeptoj de LI, kiuj jam sufiĉe estas maturiĝintaj por surŝultrigi tiun ĉi taskon.

La proponita skizo, iomete detaliganta nur la apenaŭ skizitan de Zamenhof skemon de la lingva evoluo, estas tre ne pleneca, kaj sendube havas multajn erarojn. Sed estu pardoniga por la aŭtoro la kolosa amplekseco de la temo kaj neceseco finfine starigi antaŭ ĉiuj marksanoj-mondlingvanoj la taskon entrepreni seriozan laboron pri la scienca surbazigo de HLI kaj kune (neeviteble) ankaŭ la laboron pri kreado de la marksisma lingvoscienco.

Ni devas memori, ke la fina venko de HLI estas nepre kunligita kun la konstruo de la nova lingvoscienco.

---

[1]) El la sama verko.

LA GRANDA EDUKISTO

A. PINKEVIĈ

En la historio de pedagogio ne ekzistas nomo pli granda, ol la nomo de svisiano Johann-Heinrich Pestalozzi. Ĝi estas konata al ĉiu instruisto en la tuta mondo, ĝi fariĝis la simbolo de la plej profunda pedagogia enpenetro kaj samtempe la simbolo de granda pedagogia heroaĵo. Por ni, proletaj pedagogoj, teoriuloj kaj praktikuloj, ĉi nomo estas precipe kara tial, ĉar ĝi memorigas pri unu el la unuaj provoj por praktika efektivigo de laborlerneja ideo.

Ne estas mirinde tial, ke je la centjara datreveno de la mortotago de Pestalozzi pri li oni rememoras en ĉiuj landoj, kiel pri granda instruisto, pri granda edukisto.

* * *

Pestalozzi naskiĝis en 1746 j., en familio de kuracisto-kirurgo, en urbo *Zürich*. Li atingis superan lernejon, sed ne absolvis ĝin kaj, instigata de l' deziro helpi al "la popolo", al kamparanaro, li direktas sin al vilaĝo, komencas okupi sin per agrikulturo, kaj baldaŭ organizas "institucion por malriĉuloj" (1774—1780), kie li provas kunigi instruadon kun produktiva laboro. Li ne sukcesis trovi materian bazon por sia institucio; pro la ŝuldoj li estis devigata fermi tiun ĉi unuan laborlernejon. Post tio dum 18 jaroj li okupas sin nur per literatura agado, ne provante praktike apliki siajn pedagogiajn ideojn. Dumdaŭre de ĉi jaroj li aperigas en du variaĵoj sian faman romanon "*Lienhard und Gertrud*", donintan al li tutmondan eminentecon. Sed ĉio ĉi estis nur preparado al la vera pedagogia laboro. En 1798 jaro Pestalozzi revenas al la praktika agado, akceptinte gvidadon de azilo por senzorgaj georfoj en *Stanz*. De ĉi tempo, preskaŭ ĝis la morto li ĉefas diversajn pedagogiajn instituciojn en *Burgdorf, Münchenbuchsee, Iferten*. Dum la sama periodo li aperigas siajn pleje prilaboritajn pedagogiajn verkojn. Li fariĝas eminenta, al li venas pedagogoj el ĉiuj lokoj de Eŭropo. En 1825 jaro li fermas sian *Iferten*'an instituton, kaj en 1827 j. li mortas en malgranda urbo *Brugg*, proksime de sia bieno, kie li unue provis efektivigi siajn pedagogiajn planojn.

Tia, en la ĉefaj trajtoj estas la biografio de Pestalozzi. Ĝi diras pri la granda pedagogia laboro, pri la nedisigeblo de teorio kaj praktiko en la agado de tiu ĉi rimarkinda homo. Tamen, ne tio ĉi faris Pestalozzi la plej granda pedagogo de ĉiuj tempoj. Lia senmorta merito estas — meto kaj originala, iafoje genia, solvo de la plej gravaj pedagogiaj problemoj, kaj tiamaniere kreo de nova pedagogio.

Ni montru kelkajn el la problemoj, metitaj kaj en certa grado solvitaj de Pestalozzi.

Kun la nova, antaŭ li nekonata, konvinkivo li elmetis la principon pri la "naturkonformeco" de la edukado. La edukado kaj la instruado devas esti organizitaj konforme al la apartecoj de *infan-naturo* kaj de tiu *socia medio*, en kiu la infano agos, kiel plenumanto de iu socia funkcio.

Ĉi edukado devas esti *ĝenerala*. La komenca edukado, konsistanta el preciza kaj klara ekkono de natur-elementoj surbaze de la ĝuste organizita *observado*, devas esti apartenaĵo de ĉiu homo; sendepende de lia socia situo.

La edukado akcelas *memevoluon* de la homo, ĝi sin apogas je *aktiveco* de l' infano, ĝi estas *ĉiuflanka* kaj *harmonia*, ĝi celas evoluigon de ĉiuj fortoj



de l' homo, sed ne la provizadon lian per granda kvanto da scioj je la malutilo al ĉi evoluo.

La edukado devas krei homon *aktivan* kaj *moralecan*. La moraleco, tamen, estas edukata ne per edifoj, sed nure per agoj, per la vivo ("la vivo klerigas").

Tiaj estas *la ĝeneralaj principoj* en la pedagogio de Pestalozzi. Ilia argumentizo, ilia praktika aplikado, kunmeto de lerniloj surbaze de ili — ĉio ĉi estas grandega merito de Pestalozzi. Sed li estas proksima al ni ankaŭ tial, ke li, kiel neniu antaŭ li, komprenis la grandegan socie-pedagogian signifon

de laboro en edukado kaj klerigado. Vere, li opiniis, ke la labora edukado estas necesa nur por "malriĉuloj", sed, kvankam kun tiu ĉi limigo, li tamen tute difinite elmetis kaj parte efektivigis praktike la ideon pri kunligo de instruado kun produktado. Certe, lia lernejo ankoraŭ ne estas tiu lernejo, krei kiun ni celas, sed en la vico de l' antaŭuloj de l' moderna labor-lernejo al Pestalozzi apartenas la honora loko.

Pestalozzi ne estis esprimanta interesojn de laborista klaso. Li estis tipa popolano, et-burĝa utopiisto, ne komprenanta la esencoj de tiuj sociaj delokiĝoj, kiuj estis okazantaj antaŭ liaj okuloj.

Kaj tio ne povis esti aliel. En lia epoko la proletaro ne jam ekkonsciis sin kiel klason, organizita laborista movado ne jam ekzistis. Pestalozzi travivis sian vivon en la medio de et-burgaro kaj, nature, pli malproksimen ol ĝis la simpla filantropio li ne povis iri. Li vidas malriĉigitan kamparanaron, malriĉecon de laboristoj. La unuajn li deziras instrui pri kelkaj specoj de eta industrio, kiuj povus fariĝi suplementa fonto de ilia laborgajno. Al la duaj li konsilas ŝpari, por ke ili fariĝu et-posedantoj. Li deziras neniigi "la kaŭzojn de malfeliĉo kaj de mizeroj, prempendantajn super la popolo". Sed trans la propagandon de laboramo, ŝparemo, akurateco kaj religieco li ne iris kaj li ne povis iri[1]).

Tial, malgraŭ tio ke li ŝajnus, elmetis, preskaŭ modernajn por ni pedagogiajn devizojn, — ili senevite, en la kondiĉoj de lia epoko, estis destinitaj al sengrundeco kaj neefektivigeblo.

Tamen, liaj pedagogiaj ideoj, profundaj kaj originalaj, lia praktika pedagogia agado, plena je sinoferemo kaj agema amo al homoj, fine lia provo efektivigi en sia "institucio por malriĉuloj" veran labor-lernejon, — faras lin proksima ankaŭ por tiuj kiuj konstruas la novan, proletan pedagogion.

El "Pravda" (17-II-1927) el rusigis *Dem.*



[1]) Necesas tamen aldoni, ke Pestalozzi estis tre malproksima de la hipokriteca filantropio en la nuna komuna senco de l' vorto. Li estis sincera kaj decida amiko de l' malriĉa laborularo. En la junaĝo li estis romanta popolano-revoluciulo. Poste li komencis trankvile studi la vivon de l' popolo por helpi ĝin plibonigi. Li kredis (samkiel, cetere, post li kredis Fourier, Saint-Simon, Owen k. a.), ke la "homamikoj" el la superaj klasoj venos helpi la popolon. Sed, kiam li estis farinta praktikan provon ĉi-direkte, la vivo detruis tiun iluzion, kaj Pestalozzi venis al la ideo, ke plibonigo de la situo de l' laborula popolo povas esti nur rezulto de memhelpo de l' popolo mem. Dum la franca Revolucio li estis elektita franca civitano kaj multon verkis por defendi la Revolucion, pravigante eĉ la revolucian teruron. Poste li partoprenis aktive en la revolucia Helveta respubliko (Svisio). Sed la malvenko de l' revolucio en Francio kaj en Svisio senesperigis lin kaj, perdinte sian entuziasmon, sed tute konservante la esencon de sia demokrata idearo, li estiĝis reformemulo kaj baldaŭ foriĝis de politika agado. Depost 1800 li okupis sin ekskluzive per mallarĝa instru-laboro, kiu ne prezentas — el la proletara vidpunkto — grandan socian valoron, kiel lia antaŭa soci-politika kaj pedagogia agado (ankaŭ Pestalozzi mem ne atribuis al la periodo de sia agado post 1800 grandan signifon). — *Red.*

TIPOGRAFIO EN LERNEJO

CÉLESTIN FREINET

Bazi la tutan instruadon sur la bezonoj kaj interesoj de l' infano kaj ne sur la — plejparte arbitraj kaj abomenaj por la ĉi-lasta — deziroj kaj plaĉoj de l' maturaĝuloj — jen estas la ĉefa tendenco de l' moderna edukado. Multaj eksperimentoj ĉidirekte estas farataj en diversaj punktoj de l' terglobo, kaj ni pensas, ke estas interesa por nia legantaro scii almenaŭ pri la plej gravaj el ili. La artikolo de K-do C. Freinet, kiun ni presas ĉi-sube, komencu do serion de tiaj artikoloj.

Nia amiko, K-do Freinet, vilaĝa instruisto, konata franca revolucia edukisto, tre koncize informas pri la de li iniciatita instrutekniko — tipografio en lernejo — kaj pri ĝia realigo, kiu meritas nian plenan atenton. Por ne-fakuloj tia konciza inform-artikolo sufiĉos, ĉar ĝi donos al ili ĝeneralan ideon pri l' afero. K-doj edukistoj, kiujn interesos detaloj, povos sin turni kun speciala peto senpere al la aŭtoro laŭ la adreso: Célestin Freinet, instruisto, en Bar-sur-Loup (Alpes-Maritimes) — Francio.

Ni notu, ke la aŭtoro estas simpatianto al nia SAT-movado kaj verkis ĉi-tiun artikolon speciale por nia revuo. Kvankam li bone komprenas esperanton, sed nesufiĉe posedas ĝin aktive por verki en ĝi: tial do la prezentata artikolo estas traduko el la franclingva maneskribita originalo. Dankante K-don Freinet por lia kunlaboro, ni tutkore deziru pluan progreson al lia valora eduka iniciato. — *Redakcio de "S. R."*

La psikologiaj kaj pedagogiaj fundamentoj.

Ankaŭ mi, mi estis antaŭ kelkaj jaroj endormiĝanta pro la malgaja monotonio de niaj lernolibroj, precipe tiuj de lego-scio. Sed mi ne volis lasi min esti plue dispremata de laboro premeganta kaj senprofita. Mi ekprovis reagi.

Estas tiel malfacila intime kuncentrigi la penson de l' infano sur iu donita objekto, ke eĉ ĉiuj ruzoj de l' instru-metio ne atingas la celon sen perforta devigo, laŭbezone korpo-puno. Estas tamen frapanta la fakto, ke lernanto ellernas kun facilo kaj rapido eksterordaj tion, kio estis al li proponita, en la momento, kiam li tion deziras tutplene. Faru lecionon pri glacio — oni estis al ni dirantaj — ĉu gravas, se estas preskaŭ varmege en ĉi-tago! Rezulto preskaŭ nula. Ni legu el niaj libroj la ĉapitron pri malvarmo kaj glacio: intereso kaj profito tre supraĵa.

Sed se hodiaŭ la infanoj alkuras en la klason kun belaj pecoj da glacio envolvitaj en nazotukoj, se ili estis ĝin manĝintaj, dispecigintaj, — leciono pri la glacio estas rapide farata kaj oni estos rememorantaj pri ĝi.

Jes, sed se post ĉi-tiu vivanta leciono ni estas devigitaj malfermi la legolibron "sur la sekvanta paĝo", la entuziasmo estas rompita; la spirito de l' infano ne plu avidas scii, ĝi estas senkuraĝigita ...

Oni instalas hodiaŭ la fornon en la klaso; kaj ĉiutage la lernantoj havas antaŭ siaj okuloj ĉi-novan meblon, kiu aliĝas tiamaniere al la kutimaj objektoj. Ili interesiĝas pri la fajro, pri la flamo, pri la fumo. Ili volas alproksimiĝi, senti la varmon. Estas absolute necesa paroli pri la forno kaj pri la hejtado.

Sed via sistemo ne antaŭvidis ĉi-tiun lecionon por tiu tago! Ĉu vi lasos pasi tiun unikan okazon instrui pri ĉi-temo kelkion, kio engravuriĝas en la spirito de l' infano, ĉar ĝi estas atendata kaj dezirata.

Vesperto falis en la korto. For la heziton: Necesas pri ĝi paroli, unue ĉar ĝi estas bonega okazo, sed ankaŭ pro tio, ke tre malfacila estus entiri la hipnotizitajn infanojn al aliu laboro — kiu, cetere, estus farata sen vervo, nek plezuro.

Estis terura fulmotondro dum ĉi-nokto. La infanoj aŭdis, kiel la tondro bruegis; ili estis kaŝantaj la kapon sub la litotukon por povi ne plu vidi la fulmon. Ili estas ankoraŭ tute impresitaj, kiam ili venas en la klason. Ni direktu, ni utiligu ĉi-tiun emocion; kaj jen estas leciono, kiu finiĝas per interesega legado.



Infana desegnaĵo.

Se iu libro aŭ iu senpeka plano donas la tonon al la klas-studoj, indikas matene, kia estos la intereso de l' tago, ni perdas la avantaĝojn de l' vera intereso. Krom kelkaj raraj esceptoj, ni estos kondukitaj veki en la lernejo intereson *speciale lernejan, nenature* ligitan kun la *vivo*. La *vivo* de l' lernejo ĉiam pli kontraŭos al la *vivo* de l' lernanto. Kaj la lernejo ne estos, kiel ni tion dezirus, la plej riĉa kaj la plej intensa manifestaĵo de l' vivo.

Sed ni, ni havas malgrandan tipografion. Ni verkas ĉion, kion ni opinias bona. Ni elektas, ni ordigas, ni precizigas. Poste lernantoj mem kompostas ĉi-tekston vivantan kaj sentatan. Ĉi-tiu laboro de kompostado havas intereson analogan al tiu de infano, kiu kolektas ŝtonon post ŝtono por konstrui sian lud-dometon. Kaj kiam, baldaŭ, oni legos la presitan tekston, penso simila estos aperinta.

La realigo.

Tia estis la teorio. Sed jam delonge mi estis min demandanta, ĉu tio ne estas revo nerealigebla, almenaŭ en niaj lernejoj, kie oni plenŝtopas la cerbojn, kie oni tiel timas perdi tempon ... el la vidpunkto de l' oficiala horaro!

Mi ne reparolos pri ĉiuj miaj duboj, pri ĉiuj miaj timoj, kiam, sola, *absolute nescianta* pri la tipograf-fako, mi ligis min kun miaj lernantoj al ĉi-tiu revo: ke ni mem presu nian libron. Kaj kuraĝigoj neniam estis venantaj al mi elekstere, de la maturaĝuloj, kiuj estis konsiderantaj ĉi-eksperimenton kiel provon dekomence kondamnitan; *sed ili venis de miaj lernantoj mem*, kiuj

malkovris, samkiel mi, per la praktiko la plej bonajn metodojn. Tio estas miaj lernantoj, kiuj min subtenadis ĉiufoje, kiam mi estis preta ĉion forlasi; ĉar ilia intereso al la tipografio kaj al la laboro ĝenerale fariĝis depost tiam nekredebla. Kaj dum tri jaroj ĉi-tiu intereso ĉiam nur kreskas.

Ni forĵetu do la lernolibron kaj *ni lasu* niajn lernantojn *vivi*.

Jen ili venas lunde matene kun spiritoj kaj okuloj tute plenaj ankoraŭ de la fulmotondro dum kiu, hieraŭ post kelkaj minutoj da kamparo blankiĝis pro blankaj hajleroj, ĉu ni parolu pri la vivo de plantoj, kiel ni havis la intencon? Ne, ni faros tion aliam, ni lasu nun la infanojn paroli, ni penu progresigi pliprofundigi la observojn de l' infanoj, kaj ni havos la sekvantan verketon, kiun ni kompostas:



La junaj tipografistoj kun sia instruisto.
Sur la tableto estas la literujo. Maldekstre sur la benko – la presilo.
En la medaliono – K-do Freinet.

"*La hajlo.* — La martaj batpluvoj komencis. Hieraŭ, je la tria horo falis multe da hajlo. La hajleroj, grandaj kiel globetoj, estis falantaj rekte kaj tamburadis sur la tegmentoj kaj sur la vitroj. Post kelkaj minutoj la kamparo estis tute blanka. Ni estis kontentaj kaj ni faris volvo-bulojn, sed niaj gepatroj estis dirantaj: nia malfeliĉa kamparo!"

Oni legas kun *entuziasmo* — kaj entuziasmo kiu ne perdiĝas — ĉi-tiun tekston *vivantan*. Tri aŭ kvar lernantoj ĝin kompostas; tio estas afero por dekkvin-dudek minutoj. Kaj eĉ ti-kiuj legas nur laŭsilabe kompostas sufiĉe rapide. Dum tiu laboro, en kiu la instruisto tute ne bezonas interveni, daŭras, la ceteraj lernantoj daŭrigas siajn taskojn: individuan legadon, kopiadon aŭ ekzercon rilatantan al la studata temo, kalkul-ekzercoj, laŭ la plej individuigitaj metodoj celantaj memedukadon.

Kiam la kompostado estas finita, oni presas. Per presilo mana tre primitiva oni faras 100 ekz. dum kvin aŭ dek minutoj. Ĉiu havos ekzempleron por glui en sian *libron de vivo;* kelkajn pliajn ekzemplerojn oni presas por la forestantaj. Kaj kelkiam vespere etulo sindona portas la folietojn al sia malsana kamarado, kiu tiamaniere estas bone informata pri *la vivo de sia klaso.* Kelkdek ekzempleroj estas presataj por interŝanĝo kun aliuj lernejoj.

Evidentiĝis, ke estas tre utila studi atente kaj presi ĉion el la ĉirkaŭaĵo de l' lernanto, kio meritas la atenton de l' edukisto. Sed la celo de l' edukado, ĉu ĝi ne estas ĝuste plilarĝigi nian malriĉan horizonton? Ĉu do ni ne estos devigitaj returni parte al la lernolibroj? — La plej malbona okazo.

Sed se ni estus trovintaj aliun lernejon presantan samkiel ni pri sia propra vivo kaj komunikantan al ni sian stud-materialon el la medio, kiu ĝin ĉirkaŭas, nia studo-rondo estus jam konsiderinde plilarĝiĝinta. Kaj tio estus sen la interveno ofte mallerta, ĉiam supraĵe-interesa de la maturaĝuloj.

Tio estas atingita. Kaj ĉiutage ni ekspedas al du lernejoj alilokaj kelkdekon da niaj *vivo-fragmentoj.* Estas vera ankaŭ, ke ĉiutage je la deka matene, aperas la poŝtisto kaj alportas sendaĵojn el tiuj lernejoj. Kaj vi povas imagi al vi la vervon, kun kiu niaj lernantoj sin ĵetas sur ĉi-tiujn fragmentojn, kiujn verkis iliaj malproksimaj kamaradoj loĝantaj en regionoj, pri kies loko ili eĉ ne scias; sed kies vivo estas por ili tiom interesa: ĝi ja estas vivo de aliuj infanoj.

Kia riĉeco de legaĵoj! ĉu ne vere? Kaj ne de legaĵoj kun intereso nenatura, relativa. Tio estas la vivo mem, kiu instruas niajn malgrandajn lernantojn.

En oktobro 1925 iu kamarado instruisto en Lyon-Villeurbanne (legu: Lion-Vilerban) aĉetis la tipografieton por sia klaso, kaj interŝanĝo inter niaj du lernejoj estis komencita kaj baldaŭ ĝi pruvis sian grandan edukivan valoron. Nia tuta pedagogio estas renversita per tiu-ĉi komunikado inter la vera vivo de la du klasoj. Estus tro longa ĉi-tie detale raporti pri la multaj avantaĝoj de tiu laboro[1]).

Dank' al tia kunlaboro, la eksperimento "tipografio en lernejo", elirinte el la stato de komencaj prov-serĉadoj, firmiĝis kiel instru-tekniko aplikebla en ĉiuj klasoj. La senĉesa fluo de inform-demandoj, la nombro da kolegoj, kiuj jam aliĝis al ni, — pruvas al ni, ke tiu-ĉi tekniko estis, se oni povas tiel diri, atendata de la edukistaro[2]).

Ni estas tamen nur ĉe la komenco de niaj serĉadoj. Sed ni estas hodiaŭ jam deksesopo da lernejoj diverslandaj laborantaj per tipografio. Ĉiu el niaj lernejoj sendas al la korespondanta lernejo po 30—40 presaj ekzempleroj ĉiutage (sendataj kiel periodaĵoj) kaj al *ĉiuj* lernejoj uzantaj tipografion — ĉiudusemajne. Ni povas nur antaŭvideti la eblan disvolviĝon de nia komuna laboro. Sed pluraj bonaj voloj aliĝas al ni ĉiumonate. Ni estas certe sur la bona vojo.

---

[1]) Speciala detala priskribo aperis ruslingve en la revuo "Putj Prosveŝĉenija" ("La Vojo de Klerigo" — Ĥarkov-Ukrainio), 1926, n-oj 11—12, kaj franclingve en aparta broŝuro "L' Imprimerie à l' Ecole" aperinta en januaro 1927.

[2]) Mi diras *tekniko,* ĉar la modelo de l' tipografio nemulte gravas: ĝi nur devas konveni al la celo. Tamen ni faris ĉion eblan por akiri por niaj kolegoj tipografieton praktikan, simplan kaj sufiĉan. La tuta tipografio *absolute preta por funkcii* estas nun liverebla ne pli ol por 360 francaj frankoj. Farinte tiun komencan elspezon, oni bezonas ĉiujare nur ĉ. 150 fr. fr. por presi ĉion necesan por la klaso kaj por la interŝanĝo.

LITERATURO

MALKARA SENNACIECA

	Prezo mk. g.
Faŭsto, Goethe	1.20
Eklumo en Abismo, H. Barbusse (broŝ.)	0.80
Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni	1.80
Proletaria Kantaro (74 kantoj kun notoj)	2.50
Tri Verkoj de Leo Tolstoj	0.80
El la Mondbildo de l' Nova Fiziko, Muravkin	0.60
La Kemio de la Universo, Fersman	0.60
Sekspsikologio de S. Ziegler	0.60
La Morto de Blanjo, Jean Tousseul	0.60
Ruĝo kaj Blanko de L. Ivn	0.60
La Komunista Manifesto (2-a eldono)	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1.—
Etiko de P. Kropotkin	1.80
ABC de Sennaciismo, V. Elsudo	0.50
Kontraŭ Dio! Ateista Krestomatio	0.40
Orienta Blovo	0.40
En Katenoj de la Maljusteco	0.60
Ni Legu! Brunulo. (Internacia Legolibro) (3-a eldono)	1.—
Petro, kursa lernolibro laŭ parola metodo	0.70
Labor-Kajero al Petro	0.30
Karl Marx, Lia Vivo kaj lia Verko	0.60
Ŝtato kaj Revolucio, Lenin	1.—
Je la Nomo de l' Vivo, E. Izgur	2.—

La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj

Mendu ĉe Administracio de SAT

Rich. Lerchner, Leipzig O 27

Colmstrasse 1, (Poŝtĉek-Konto 6835.)